Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 14an de aprilo 2011, per Skype.

(Aprobita la 12an de majo 2011.)

Partoprenis:
Jardar Eggesbø Abrahamsen (JEA) en Trondheim
Ulf Lunde (UL) en Os
Anne Karin Bondhus (AKB) en Bryne dum la plejparto de la kunveno
Asbjørn Lindh (AL) en Oslo
Ingebjørg Rambjør (IAR) en Bergen
Eli Eriksen Fitjar (EEF) en Töreboda dum partoj de la kunveno, sed ŝi havis problemojn pri la konekto precipe dum punkto 5

0. Tagordo
Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 10an de marto 2011.
La protokolo estis aprobita.

2. Ekonomio
La situacio de la kontoj estas tiel:
Skagen Høyrente: kr 59.016
Skagen Vekst: kr 38.055
La konto ĉe DnB NOR estas ĉesigita laŭ la decido dum la pasinta estrarkonsiliĝo.

3. Invitilo al s-ro Amparado el Kubo – ĉu NEL volas prizorgi tion?
JEA raportis pri la afero, kiu originas en letero de Tomas Jansson. Temas pri elirpermeso. NEL ne riskas ekonomiajn devojn koncerne la restadon de s-ro Amparado. La estraro de NEL petas al Tomas Jansson verki la invitleteron. Se bezonatas «la signaturo de NEL», estas en ordo.

4. Informoj pri la preparado de la Landa Kongreso en Tromsø
Geir-Arne Paulsen ne partoprenis la kunvenon, sed la estraro ricevis retpoŝton pri la progreso de la preparado.

5. Oferto pri globkrajono
La estraro ekhavis leteron de Douglas Draper pri globkrajonoj kun lampeto. La estraro decidis ke JEA sendu leteron al Douglas Draper petante lin prizorgi mendon de 50 tiaj krajonoj kun la teksto: NORSK ESPERANTO-FORBUND 100 ÅR 2011
Ni disdonacos al la ĉeestantoj dum la Landa Kongreso.

6 Eventualaĵoj
Nenio.

Venonta kunveno estos la 12an de majo.
La kunveno daŭris inter 19.30 – 20.40.
Raportis Ingebjørg Rambjør